



# Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

N-ro 5  
1974

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO  
Redaktoro: Hans Amund Rosbach

3-a periodo  
41-a (50-a) jaro  
Dumonata

## Grava kongreso en Hamburgo

Al la 59-a Universala Kongreso de Esperanto aliĝis entute 1650 homoj — el ili 25 norvegoj. La granda plimulto de la esperantistoj en nia lando do ne ĉeestis la kongreson, kaj tial ili certe deziras iom aŭdi pri ĝi de Norvega partopreninto.

Mi ne provos rakonti al vi ĉion kio okazis en la kongreso, ĉar per tio mi plenigus multajn numerojn de Norvega Esperantisto. Niaj du plej grandaj internaciaj periodaĵoj, Heroldo de Esperanto kaj Revuo Esperanto, donos ampleksajn raportojn el la kongreso. Nepre legu tiujn!

Mi provos ĉefe paroli pri tiuj eroj kiuj distingis la lastan kongreson de pli fruaj kongresoj.

### BONEGA KONGRESEJO

Niaj kongresoj kutimas okazi en konstruaĵoj kreitaj por tute aliaj celoj, kaj tial la kongresejoj estis kelkfoje pli, kelkfoje malpli konvenaj por la Universalaj Kongresoj.

Congress-Centrum Hamburg male

estas kreita por servi kiel kongresejo kaj verŝajne plenumas la revojn de ĉiu kongresorganizanto. Ĝi situas en la bela parko Planten un Blomen en agrabla proksimo de urbo-centro, universitato kaj Alsterlagetoj. En la grandega domo troviĝas granda nombro da bone ekipitaj, lumigitaj, aerumitaj salonoj en tre variaj grandecoj. En niaj Universalaj kongresoj fariĝis tradicio doni al la salonoj nomojn de eminentaj personoj en la historio de Esperanto. En Hamburga kongresejo 14 salonoj ricevis tiajn nomojn. Ekzemple la plej granda salono, kie okazis la oficiala malfermo de la kongreso, estis salono Zamenhof. La teatra salono estis salono Privat laŭ la iama prezidanto kaj poste honora prezidanto de UEA — profesoro Edmond Privat. En vasta akceptejo en la teretaĝo estis abunda spaco por la kongresaj giĉetoj, diversaj informtabuloj kaj Esperanta librovendejo. La kongresejo havas du restoraciojn.

(daŭr. p. 68)

## Sciigoj de N.E.L.

La 44-a Norvega Esperanto-Kongreso okazos en Tromsø 5.—7. Julio 1975, verŝajne kun postkongresa ekskurso al la Norda Kabo. Oni atendas ankaŭ multajn eksterlandajn kongresanojn. Preparu vin jam nun por la vizito al Norda Norvegujo, ĉar oni devas tre frue mendi biletojn kaj hotelĉambrojn. Laŭeble baldaŭ oni dissendos cirkuleron kun aliĝiloj kaj detalaj informoj.

60-a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Kopenhago 26. Julio — 2. Aŭgusto 1975. Aliĝojn kaj mendojn peros Turisma Servo de N.E.L., Boks 942, Oslo 1, poŝtĝirokonto 1.00.32.

La Oficeja Fondaĵo. La Liga Estraro kore dankas al ĉiuj bonkoraj donacintoj por tiu grava fondaĵo. Sed ni daŭre bezonas pliajn donacojn por teni la oficejon. Ĉiuj donacoj estas bonvenaj, ĉu grandaj, ĉu malgrandaj.

Taskotabelo por kluboj. — Novembro: La estraro sendas registritan informon al ĉiuj membroj, kiu ne ekŝiĝis laŭ la statuto, sed de kiu tamen revenis la poŝta enkasigilo sen pago, ke oni nun forstrekos ilin kiel klubanojn. La estraro admonas al ĉiuj klubanoj pagi la kotizon por la venonta jaro. La Delegito de U.E.A. kolektas la U.E.A.-kotizojn por la venonta jaro kaj varbas novajn Individuajn Membrojn de U.E.A. Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato.

### La Liga Estraro

#### La kontorfondado

Pli frue ..... kr. 1232,20  
C.S.B. .... » 10,00  

---

kr. 1242,20

#### Kampanjo Reisceter

Pli frue ..... kr. 1700,00  
Valborg Malling ... » 100,00  
C. Støp-Bowitz .... » 100,00  

---

kr. 1900,00

Sinceran dankon al ĉiuj donacintoj!

## Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

### Provizora redaktoro :

Hans Amund Rosbach  
Johan Hammond Rosbach

### Adreso de la redakcio :

Nergt. 37 c, 6500 Kristiansund N  
(Limdato por manuskriptoj: la 20.  
en la monato antaŭ la apero.)

Abonprezo : En Norvegujo kaj eksterlando : n. kr. 12,—.

Anonprezoj: 1/1 p. kr. 150, 1/2 p. kr. 75,  
1/4 p. kr. 40, 1/8 p. kr. 20.

## La sola maniero

La brita parlamentano, s.ro Ernie Money, diris en sia parolado, ke instruado de Esperanto en la lernejoj estas la sola maniero, per kiu ni povas solvi la lingvan problemon de la mondo.

Ni montras al liaj vortoj, aliloke citataj, kaj substrekas la neceson persone persvadi la parlamentanojn de Norvegujo subteni Esperanton.

Sed ankaŭ ni volas diri ion pri la sola maniero: Vi nepre ne povas persvadi iun ajn, se vi parolas pri la facileco de Esperanto, kaj mem nur balbutas la lingvon! Tial la sola maniero estas via porpra uzo de la Internacia lingvo — per ĝi vi povas pruvi, ke Esperanto taŭgas, ke per Esperanto ni povas kontaktiĝi kaj amikiĝi kun alilandanoj.

Tial via vojo estas: Studo. Praktiko. Legado de libroj, skribado de leteroj.

Bonan sukceson!

## Brita parlamentano parolas :

El la parolado de s.ro Ernie Money, brita opozicia ministro pri kulturo, ni citas:

«Mi estas politikisto: kaj mi forte opinias, ke la vera demokratio dependas de la homoj mem kaj de ilia kapablo interkompreniĝi. En la ege kompleksa mondo, en kiu ni vivas, fronte al ĉiam pli kompleksaj problemoj, nun gravas pli ol kiam ajn antaŭe, ke ni komprenu unu la alian sur individua bazo kaj ne nur per formalaj politikaj kanaloj.

Tiu, kiu malbone parolas fremdajn lingvojn — kiel mi ekzemple — scias, kiel kore oni deziras libere paroli kaj vere amikiĝi kun alilandanoj. Bedaŭrinde, tiu deziro ofte malaperis sub amaso da neprononceblaj vortoj kaj nekompreneblaj frazoj.

Tial mi persone kredas, ke Esperanto estas necesa por la estonteco de ni ĉiuj — necesa, ĉar Esperanto antaŭenigos la pacon, — necesa, ĉar Esperanto estas vera bazo por individua amikeco — kaj necesa, ĉar nur Esperanto ebligas al venontaj generacioj lerni lingvon taŭgan por ĉiuj, lingvo kiu forprenas la privilegion de la lingva elito.

Mi deziras, ke parlamentanoj en ĉiuj landoj konsciui pri la granda valoro de Esperanto. Mi deziras, ke vi ĉiuj kontaktu viajn parlamentanojn kaj ke vi persvadu ilin subteni la instruadon de Esperanto en la lernejoj; ĉar tio estas la sola maniero, per kiu ni povas solvi la lingvan problemon.»

## Grava kongreso —

(daŭr. de p. 65)

el kiuj la pli granda estas por memservado. Ĝia anonco en la kongreslibro reklamis: «La bela memserva restoracio. Pli ol 30 rapidaj bongustaĵoj je malaltaj prezoj.» Nu, kiu restoracio ne laŭdas siajn ejojn, manĝaĵojn, prezojn? Pri «Kranzler Garten» oni volonte konfirmas la anoncon. Kvankam Garten estas la Germana vorto por ĝardeno, la restoracio troviĝas interne de la kongresa domo en tre belaj salonoj, kun elirejo al vasta teraso kun tabloj kaj seĝoj, kien kongresanoj kunportis siajn manĝaĵojn kaj trinkaĵojn kiam la vetero tion permesis. Ĉiuj manĝoj kiujn mi gustumis, estis tre bongustaj, kaj la prezoj agrable surprizis.

En horoj de sunbrilo granda parto de la kongresanaro troviĝis promenanta en la bela ĉirkaŭanta parko.

### IDEALA KONGRESA VETERO

Ĉar norvegoj laŭdire ĉiam parolas pri vetero, mi ne preterlasas veterraporton. Hamburga vetero en tiu semajno estis la plejeble taŭga por kongresaj kunvenoj. Enirante kunvenejon oni forlasis ekstere inundan pluvadon. Kiam la kunvenoj de la tago finiĝis, oni ofte povis eliri en brilajn sunon.

Laŭ la tradicio jaŭdo estas libera tago, kiam la kongresanoj konatiĝas kun la kongreslando kaj kun aliaj kongresanoj dum ekskursoj per ŝipoj, aŭtobusoj, vagonaroj. Pro lerta aranĝo de la Loka Kongresa Komitato tiu tago estis preskaŭ senpluva. Cetere mi sincere aldonas ke Hamburgon oni

povas ĝui en ĉia vetero; dum pluvoj oni simple promenadas sub arkadoj, kiuj abundas en tiu urbo.

SOLENA INAŬGURO —  
IVO LAPENNA ADIAŬAS —  
SALUTONTOJ DE LANDAJ  
ASOCIOJ DEVIS SILENTI

En niaj kongresoj la kunveno de la oficiala malfermo havas pli multajn partoprenantojn ol iu alia kunveno. Ĝi estas la kunveno de la multaj salutoj, — salutoj longaj kaj mallongaj, solenaj, seriozaj, gravaj kaj pensigaj, humuraj, gajaj kaj ridetigaj.

Aganta urbestro, senatano pri kulturo salutis en la nomo de «Libera kaj Hansa Urbo Hamburgo». Salutojn de la Germana ministro pri scienco kaj klerigo transdonis ministeria konsilisto. Ambaŭ esprimis simpatian kaj komprenon por la celoj de la Esperanta movado, kaj ambaŭ ricevis konvenajn respondajn salutparoladojn. Salutis oficialaj reprezentantoj de 18 landaj registaroj. La plimulto parolis en gepatra lingvo kun traduko en Esperanton. Kiel en antaŭaj kongresoj la kongresanaro esperis ke iu oficiala reprezentanto parolos en la Internacia Lingvo — kiel faris sisteme la urbestro de Oslo, Brynjulf Bull. Ni ne vane esperis: En Esperanto salutis kaj la reprezentanto de la Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj de Israelo kaj la Ĝenerala Konsulo de Usono, kaj ili ricevis pro tio tondran aplaudon. Kompreneble ankaŭ la oficiala reprezentanto de la Norvega registaro, Rolf Bugge-Paulsen, salutis en Esperanto, kaj estis konvene aplaudata. John Berggreen prezentis saluton de la Skolta Monda Ofi-

cejo. Grandan atenton vekis la ministro pri kulturo en la Brita «Ombro-registaro», s-ro Ernle Money, kiu en Esperanto salutis la kongreson en la nomo de la «Grupo por Esperanto» en la Brita parlamento.

Laŭ tradicio reprezentantoj de landaj Esperanto-asocioj en alfabeto vico mallonge salutis la kongreson. Tiu multnacia salutado estas tre populara inter kongresanoj kaj donas valoran etoson al la malferma kunveno. Tial ĉiuj bedaŭris la sciigon ke pro manko de tempo la salutontoj de la landaj asocioj, kiuj jam sidis pretaj sur la podio, ne ricevos parolrajton por doni siajn salutojn. Anstataŭe ili estis rapide menciataj per nomoj kaj landoj.

Atendis nin ankoraŭ alia surprizo en la malferma kunveno: En sia festparolado la prezidanto, Ivo Lapenna, anoncis sian decidon ekŝiĝi el ĉiuj siaj funkcioj en Universala Esperanto-Asocio. La sciigo venis kiel ŝoko kaj sur la Komitato de UEA kaj sur la ĝeneralan kongresanaron. Ĉiu sentis fortan bedaŭron pro la sciigo, kiu malgaje influis la kongresan etoson dum la tuta kongreso.

Kiel kutime la malferma kunveno finiĝis per tio ke la kongresanaro komune kantis la Esperantan Himnon.

### LABORKUNVENOJ

La kongreso en Hamburgo havis pli ol 100 kunvenojn kaj aliajn programerojn. La plimulto el tiuj 100 estis laborkunvenoj, ekzemple:

Ĝeneralaĵ kunvenoj de UEA  
Kunsidoj de la Komitato de UEA  
Kunveno de Landaj Informaj Fakoj  
Debato - pri landaj Esperanto-revuoj  
Landaj asocioj: Kion fari kontraŭ perdo da membroj?

Tutmonda Esperanta Junulara Organizo: Publika Debato

Granda nombro da fakaj kunvenoj

Preskaŭ ĉiujn kunvenojn la kongresanoj povis libere eniri, kaj la partopreno estis ĉi-jare multe pli granda ol kutime.

Specialan atenton havis la kunsidoj de la Komitato de UEA. Ĉiuj kongresanoj rajtas kiel publiko ĉeesti tiujn kunsidojn, sed kompreneble nek partopreni la diskutojn nek en iu ajn alia maniero esprimi sian opinion. Dum tiuj kunsidoj la publiko ne nur tute plenigis la salonon, sed ankaŭ en la koridoro sidis dense ĉirkaŭ la pordoj.

HUMPHREY TONKIN

*nia nova prezidanto*

FLORA SZABO-FELSÖ

*unua virino en UEA-estraro*

CARL STØP-BOWITZ

*unua norvego en UEA-estraro*

Jam en la malferma kunveno Ivo Lapenna sciigis sian decidon ekŝiĝi el ĉiuj siaj oficoj en UEA. En la sekvantaj tagoj gvidantaj esperantistoj faris multajn klopodojn por igi lin ŝanĝi sian decidon aŭ almenaŭ akcepti elekton kiel honora prezidanto. Iliaj klopodoj estis vanaj, kaj vendredan vesperon la Komitato elektis novan estraron kun ĉi tiu konsisto:

Humphrey Tonkin (Brit.), prezidanto  
Werner Bormann (Germ.), vicprez.  
Carl Støp-Bowitz (Norv.), vicprez.  
E L M Wensing (Nederl.), ĝen. sekr.  
Pól Denoël (Belgio)  
Flora Szabo-Felsö (Hungario)  
Stanislav Šwistak (Pollando)  
J E Woessink (Nederlanda)

El la novaj estraranoj nur Werner Bormann kaj J. E. Woessink ankaŭ estis membroj en la ĝisnuna estraro. Duono el la estraranoj, nome Werner Bormann, Carl Støp-Bowitz, Pól Denoël kaj Stanislaw Swistak estas prezidantoj de siaj landaj asocioj, dum Flora Szabo-Felső estas prezidanto de Tutmonda Esperanta Junulara Organizo. — Nia nova prezidanto, la du vic-prezidantoj kaj Pól Denoël estas doktoroj, kiel estas ankaŭ nia ĝisnuna prezidanto.

### VESPERAJ ARANĜOJ

Ĉiuvespere okazis io, tiel ke neniu bezonis cerbumi por trovi ion por fari.

La unuan vesperon okazis la tradicia «Interkona Vespero», en kiu la kongresanoj serĉas kaj trovas malnovajn kaj novajn amikojn. Novaj esperantistoj provas sian kapablon paroli la lingvon kaj la kapablon de la aliaj kompreni ĝin. Dum tiu kaj pluraj aliaj kongresaj aranĝoj ni havis la plezuron vidi kaj aŭskulti la ludadon kaj kantadon de la Slovaka «Kvarteto Esperanto», kiun multaj kongresanoj jam konis el la lastjara kongreso en Beogrado.

«Germana Vespero» konatigis nin kun Germanaj popoldancoj, ĉasistaj trumpetsignaloj kaj virhora kantado, parte en Esperanto, parte en dialekto de la Hamburga regiono.

La Bulgara Esperanto-Teatro, kiun bone konas kongresanoj el la proksimaj jaroj, lerte prezentis al ni «La Barbiro de Sevilla» kaj rikoltis multan aplaŭdon.

Aliaj vesperon du Polaj geaktoroj esperantistaj — Kalina Pienkiewicz kaj Zbigniew Dobrzynski — prezentis

«Proksima Nekonato» de Pola aŭtoro Alexander Scibor-Rylski, kaj pro la granda sukceso ili devis ripeti la prezentadon ankoraŭ alian vesperon.

Plue la programo de la kongresa semajno ampleksis Junularan Vesperon, Oficialan Bankedon, Balon kaj prezentadon de la Esperanta krimfilmo «Angoroj».

La lasta el la vesperoj estis Internacia Arta Vespero, en kiu ni povis ĝui dancadon, kantadon, muzikon — ĉion prezentitan de esperantistoj kiuj estas plej eminentaj en sia arto. Tio estis vespero de ĝuado, aplaŭdado, de bonega kontakto inter la artistoj sur la podio kaj la kongresanaro en la salono. Tiu kontakto eble estis plej forta kiam Ramona van Dalsem al ni kantis ŝiajn kantojn laŭ tekstoj kaj melodioj kiujn ŝi mem verkis kaj komponis, kaj kiuj al multaj el ni ŝajnas ankoraŭ pli kompreneblaj ol la plej facila lingvo de la mondo — Esperanto.

Dum tuta kongresa semajno kongresanoj reciproke demandis: «Ĉu vi scias kie okazos la venonta Universala Kongreso?». Nur je la fino de la Internacia Arta Vespero ni ricevis la respondon:

### LA JUBILEA 60-a UK ESTOS EN KOPENHAGO

El la koncertsalono la kongresanoj kuris al la ĝiĉeto por Kopenhago en la teretaĝo kaj ekstaris en vico por plenigi la kongresan aliĝilon kaj pagi la kongreskotizon.

La supra raporteto donas nur malmultajn el la tre multaj detaloj en la kongreso. Pli grava ol detaloj de okazaĵoj estas tamen la ĝenerala im-

preso: La kongresanoj sentis sin kiel unu tuto, ĝuis komunan kunvenradon, komunan sinokupon pri la problemoj en la kongreso.

Kongresano

## Ĉu vi tradukas?

Skribi en Esperanto, kiam oni pensas en Esperanto, estas unu afero. Traduki frazojn el nacia lingvo estas tute alia afero. Kiam oni tradukas oni ofte, vole aŭ nevole, ligas sin al la nacia esprimmaniero, al la tiel nomitaj idiotismoj. Kelkfoje ankaŭ naciolingva vorto havas diversajn signifojn; ni menciuj nur la norvegan vorton *ekspedisjon*, kiu signifas jen ekspedicio ekz. al la Norda Poluso, jen ekspedejo.

Ĉi tie ni prezentas kelkajn norvegingvajn frazojn, kaj vi provu traduki ilin Esperanten. Ni revenos en postaj numeroj kun proponoj pri tradukoj kaj komentarioj. Bonan ŝancon!

- 1 Hvor mange trinn er det på foten til monumentet?
- 2 Hva slags trær er det som vokser i parken?
- 3 Min onkel har solgt to hundre grisunger.
- 4 Banantreet har de største blad som finnes.
- 5 En smal vei slynger seg gjennom vinmarkene.
- 6 Taket på min onkels hus er dekket med dyrehuder.
- 7 Banditten har iført seg et stripebadehåndkle.
- 8 Kvinnene vanner blomstene for at de skal vokse fortere.
- 9 Gamlingene bærer sine fiskeredskeer til vannet.
- 10 Ungdommen har dannet et lite orkester av fløytespillere.

## Neoficiala kongreseparto

(Mel.: Pål sine høner)

Kari Kokkin'ojn sur ŝipon ellasis, ĉiuj sur voj' al Hamburga kongres'. La veturado agrable ja pasis, manĝo, trinkad' estas ĉiam sukces'. Sur la ŝip' regis nur idilio, sed ni sentis: okazos nun io; estas la ĝermo de revolucio antaŭ reveno al hejm' kaj patrin'.

La gekokinojn kun spert' gvidis Kari al la grandurbaj danĝeroj sen fin'. Ĉiam kun preta propon' kion fari, vidi, travivi, kun paĉjo Kokkin. Ĉio estas ja nur idilio. Eble tamen okazos jam io dum ni diboĉas en restoracio ĝis la reiro al hejm' kaj patrin'.

La kongresejon la grupo vizitis kiam allogis teatro aŭ bal'. Dume la Komitatoj jam ŝvitis, jam komenciĝis la granda batal'. Certe regis ne plu idilio; post kulisoj okazis jam io. Estis necesa la revolucio antaŭ reiro al hejm' kaj patrin'.

Dum l' Inaŭgur' jam eksplodis la bombo: klare anoncis al ĉiu el ni la prezidanto kun granda aplombo sian ekŝigon el ĉiu funkci'. Li deklaris kun granda pasio: Ne plu regas ja nur idilio; mi pro l' abscesoj foriros de ĉio post la kongreso al hejm' kaj patrin'.

La Komitato kun granda laboro ade kunsidis ĝis post noktomez'. Novan estraron kun freŝa fervoro vere ĝi trovis, jen bela sukces'! Restariĝis nun la idilio. En Hamburgo okazis do tio. Post la sukceso de l' revolucio pace reiris ni al la patrin'.

La kongrespoeto.

## Recenzoj

Johan Hammond Rosbach: VERDA ROBO. Dansk Esperanto Forlag, Åbyhøj. 96 paĝoj, 15 × 20 cm. Prezo dkr. 30,—.

Rosbach eniris la kampon de la krimromano. La rezulto estas komponaĵo kun la kutimaj ingrediencoj kun vico de mistikaj eventoj, tamen ĝi ne estas ordinara krimromano. La scenejo estas ripozhotelo kaj la ĉirkaŭa kamparo kun lago en Norvegujo. Per trafaj skizoj kaj laŭ la malsamaj reakcioj je la maltrankviligaj eventoj, oni bone konatiĝas kun ĉiu opa gasto de la hotelo, oni ĉeestas iliajn interesajn diskutojn — ofte filozofiajn — precipe kiam nova evento okupas la mensojn de la hotelgastoj. Kaj ĝuste en tiuj konversacioj teksitaj kun historioj kun frapaj koincidoj ni vidas ke majstro de la rakontarto turnas la scenejon, kaj tie ni rekonas la noveliston Rosbach. Fine okazas io tre grava, kio solvas ĉiujn problemojn. Mi ne rekomendas tiun ripozhotelon por nervuloj.

Sed la ĉefa valoro de la libro estas ĝia lingvaĵo. Ĉe Rosbach la internacia lingvo vivas sian propran integran vivon, oni neniam trovas spurojn de naciismoj. Tial, eble ankaŭ pro liaj pedagogiaj spertoj, lia scipovo diri la aferojn per simplaj esprimoj, liaj verkoj tre bone konvenas por lingva studado. La grupo de Trondheim dum la lasta duonjaro trastudis lian *Disko*, kaj montriĝis, ke la studanto bone komprenas, sed kiam oni volas traduki norvegen, oni rimarkas la apart-

ajn ecojn de Esperanto sub la mano de vere internacia verkisto. Mi sen hezito rekomendas ankaŭ *Verda Robo* por tia celo krom por agrabla distraĵo.

La vortaristo povas noti novaĵojn: izoporo (38), raslado (58). Preseraroj preskaŭ tute forestas, tamen: *ekzo* (= edzo, p. 25), *siaj* (= ŝiaj (ŝtrumpoj) p. 43), kaj mi tuj konstatas la kaŭzon: La libro estas kompostita en Esperanta presejo (UEA).

EAH

Esperanto I. Norvega Esperantista Ligo kunlabore kun Folkets Brevskole. 96-paĝa kajero.

Jen la kvin instruletoj de la leterkurso de Norvega Esperantista Ligo aperas en kajero, en sia 2a, reviziita kaj pligrandigita eldono. Kiel leterkurso ĝi jam faris sian ekzamenon kun tre bona rezulto, pri tio atestas la nombro de novaj esperantoj, kiuj lernis la lingvon surbaze de la leteroj. Nun ĝi do ankaŭ aperas kiel lernolibro por memstudo kaj por kursoj. Kaj kion ni trovas?

Mi ne uzis la libron por instruo, sed mi mem tralegis ĝin. Kaj vere, mi rekomendus tiun ĉi libron al la norvegaj lernejoj dum sepa kaj oka instruaroj, ne pro la internacia lingvo, sed pro la instruo de la norvega, la angla kaj precipe la germana! Neniam mi trovis tian klaran gramatikan klarigon, pri substantivo, adjektivo, verboj, subjekto, objekto ktp, klarigon tre necesan por la lingva instruo, sed ankaŭ tre neklaran en la norvegaj lernejoj, se mi juĝu laŭ la scioj de tiuj infanoj, kiujn mi mem renkontis diversmaniere kaj diversloke.

Ankaŭ la instruo de nia lingvo havas saman klaran karakteron. — Mi senhezite rekomendas la libron.

Hans Amund Rosbach

KANTU KUN RAMONA. Tekstoj de la melodiarioj de Ramona van Dalsem. 24 paĝoj, 10 × 15 cm. Prezo dkr. 3,50.

22 kantoj. La versoj ne pretendas esti poezio, ilia tasko estas akompani muzikon. Tamen troviĝas poemoj en la kolekto, kiuj sukcese defendus sian lokon flanke de la rekonataj poemaroj, ekz. *Kantu merlo, kantu!* (12) kaj *La vojpirato* (13) kaj pluraj aliaj. Bedaŭrinde, ke ni ne sciiĝas, kiu ilin verkis.

La kantaro povas facile pliriĉigi la kantadon dum la klubkunvenoj. Oni simple ludu la diskojn de Ramona, unue aŭskultu ŝian ĉarman voĉon kaj poste kun la kantaro en la mano lernu la melodiojn de ŝi laŭ la rekta metodo.

EAH

Hodiaŭa Tibeto. Fremdlingva Eldonejo, Peking 1974.

Vere bela libro kun abundo da koloraj kaj nigre/blankaj bildoj el la fora montara lando Tibeto, kun amaso da ridetantaj homoj sur la bildoj.

Dum ni parolas pri la «okupita» lando «Tibeto», la ĉinoj parolas pri la liberigita lando, kaj tiu ĉi bildlibro certe estas rezulto el la konflikto inter la du esprimoj: La ĉinoj volas montri la landon kia ĝi estas hodiaŭ, prosperanta, feliĉa. Kaj certe, la libro prezentas la belegan naturon, la agrikulturajn gajnojn, la modernajn fabrikojn — kaj la popolon. Kaj, kiel

mi jam diris: La homoj ridetas. Iom tro ili ridetas, laŭ mia opinio, eĉ en laboroj kiuj estas tre penigaj, la homoj ridetas. Kaj tio igas min iom malfidema, tio ŝajnas al mi aranĝita, precize por montri la feliĉon, sub kiu la popolo nun vivas.

La tre bela libro havas tekston en la angla, sed enmetita kajero havas la tutan tekston en Esperanto. Kaj: Krei belajn librojn la ĉinoj scias.

Haro

## † Forpasis Arne Gram

Forpasis Arne Gram, unu el la fidelaj membroj de «Mara Vento» en Hauge-sund. Li mortis subite, survoje al la UK en Hamburgo.

Gram estis homo de bona volo — idealisto kun vasta pensospektro. Esperanto estis al li afero serioza, kaj li multe okupiĝis pri la penso kiel plej rapide kaj efike antaŭenpuŝi la aferon.

Li sciis krei ĉirkaŭ si etoson de bonhumoro, kaj kiam necesis, li ĉiam estis preta konsili kaj helpi. Postvivos lin belaj memoroj — ni mankosentos lin kiel bonan amikon kaj fidelan samideanon.

oto

## ~~~~~~ Anonco:

La dana ilustrita esperanto-revuo «Eño» estas aboninda ankaŭ por norvegaj geesp.istoj. - Abonprezo: 25 d. kr. jare. Aperas 6-foje jare. Ekspedo: GUNHILD HALAGER, Erantisvej 2, Tilst, Dk-8381 Mundelstrup, Danlando

## Donacoj

De tempo al tempo iu memoras, ke ni kolektas uzitajn poŝmarkojn por la fortigado de la ekonomio de Norvega Esperantisto. Klubo Esperantista en Oslo kaj Saxer Ebeltoft, Arendal, sendis poŝmarko-donacojn, pro kiuj ni kore dankas.

Memoru, ke la adreso por ĉiaj poŝmarkosendaĵoj estas J. Hammond Rosbach, 1700 Sarpsborg. Ni antaŭvidas en la venonta laborsezono multajn monigotajn poŝmarkojn. Antaŭdankon!

## Informeto

Nun estas organizata kampanjo, por ke Radio Budapest rekomencu siajn disaŭdigojn en la internacia lingvo. Skribu leteron aŭ pk al Radio Budapest, 1800 Budapest, Bródy Sándor u. 5—7, petante regulajn disaŭdigojn en Esperanto. Bonv. reskribi, se vi jam skribis. Nur amaso da eksterlandaj korespondantoj povas konvinki grandan radiostacion. Jen ni havas bonan eblecon gajni pliajn disaŭdigojn en Esperanto.

### POŝMARKA DONACO

S-ro Nikolaj Starodubcev, Doneck, USSR, donacis belajn poŝmarkojn al Norv. Esperantisto. Ni kore dankas! Ĉu aliaj faros same?

### RADIO-INTERVJUO

La norvega radio intervjuis Johan Hammond Rosbach okaze de lia nova libro. La kvinminuta intervjuo okazis en Østlandssendingen.

## Instruista Sekcio de NEL

jam ekzistis dum multaj jaroj, sed ĝi estis pli malpli pasiva. La nuna estraro provis vigligi la sekcion, krei kontakton inter la membroj, kaj agadi por enigi Esperanton en la lernejojn. La estraro konsistas el: Prezid. Elna Matland, Sauda, sekretario Margrete Landmark, Oslo, kaj ano Olav Andersen, Sauda. La sekcio havas 45 membrojn, la sistemo estas tiel ke se vi estas profesia instruisto kaj membro de NEL, vi aŭtomate fariĝas membro de la instruista sekcio de NEL.

Nia landa sekcio estas membro de ILEI (la internacia ligo por esperantistaj instruistoj). Kiel membro vi do povos utiligi la internaciajn servojn kiujn povas oferti al vi ILEI: partoprenon en internaciaj pedagogiaj konferencoj en instruistaj kunvenoj dum la kongresoj, en feriosemajnoj kun kolegoj el multaj landoj k. s.

La sekcio propagandas por Esperanto en instruistaj gazetoj, kaj prilaboras la departementon koncerne kursojn en Esperanto.

E. M.

## Heroldo de Esperanto informas:

Pro la kreskantaj preskostoj la abonotizo por Heroldo 1975 estos kr. 56,-. Sed *novaj* abonantoj 1975, kiuj nun pagos por la venonta jaro, rajtos pagi laŭ la malnova tarifo (kr. 51,-), kaj krome ricevos senpage ĉiujn numerojn dum la resto de 1974. — Ĝis la fino de Decembro oni ankaŭ akceptos dumvivajn abonantojn laŭ la malnova, nealtigita tarifo. — Abonojn akceptas Esperantoforlaget A/S.

## JUBILEO

### Hans Amund Rosbach 50-jara

Nia fidela (kun)redaktoro dum jardekoj, kaj nun (provizora) ĉefredaktoro de Norvega Esperantisto, pastro Hans Amund Rosbach, Kristiansund, fariĝis 50-jara la 9an de Septembro.

Rosbach tre frue interesiĝis pri Esperanto kaj lernis la lingvon, kaj baldaŭ li ekaktivis en la movado. En sia hejmloko Røros li fondis Esperantoklubon. Dum sia studenta tempo li estis ĝenerala sekretario de N.E.L. dum kelkaj jaroj. Poste, kiel pastro, li servis en diversaj lokoj, Hasvik, Folldal, kaj nun en Kristiansund N., kie li estas, kompreneble, Delegito kaj Fakdelegito de U.E.A.

Je diversaj okazoj li plenumis diservojn en Esperanto, ekz. dum la Universala Kongreso en Kopenhago 1962, dum la Skandinavia Esperanto-Kongreso en Oslo, la Norvega Esper-

anto-Kongreso en Løten kaj la I.F. E.F.-Kongreso en Hamar.

Aparte menciinda estas lia intereso pri la skoltoj. Li estas komisiito de N.E.L. pri skoltoj kaj atingis kelkajn belajn sukcesojn por Esperanto en la norvega skolta movado, kaj li estas redaktoro de *La Skolta Mondo*, la organo de Skolta Esperantista Ligo.

Aldone al ĉio tio, kaj al tre laborriĉa pastra ofico, li trovis tempon kaj energion ankaŭ por literatura agado. Konataj estas liaj religiaj eldonaĵoj «Cent himnoj» kaj «Preparoj al Diservo», kaj ankaŭ lia «El propra kaj fremda» kun tradukoj de pecoj el diversspeca literaturo. Siatempe li prizorgis ankaŭ la tradukon de «Faktoj pri Norvegujo».

Apartan dankon ni ŝuldas al Hans Amund Rosbach pro liaj preteco kaj kapablo savi nian revuon, efektive plurfoje, dum krizaj momentoj. Pro siaj multaj valoraj aktivadoj li estas Komandoro de PRO MERITO.

Postfeste nian elkoran gratulon!

C. Støp-Bowitz

## La 60-a Universala Kongreso de Esperanto

elektis Lokan Kongresan Komitaton: Gustav Kühlmann, prezidanto, Svend Dragsted, Ejnar Hansen, Karen Hansen, Bodil Kühlmann, Lizeta Kühlmann, ĉiuj danaj, Jan Strønne el Svedujo kaj Victor Sadler kaj Simon Milojević el la Centra oficejo de UEA.

La aliĝklotizoj antaŭ la 31-a de decembro estas:

Kongresano, kiu ne estas individua membro de UEA: 118 ned. gld.  
Kongresano, kiu estas MJ: 98 gld.

Kongresano, kiu estas MA: 78 gld.  
Edzo (aŭ edzino): 82,60 aŭ 68,60 gld.  
Universitata stud. ĝis 30-jara: 59 gld.  
Blindulo: 47,20 gld.

Oni pagu al UEA, de kiu oni povas ricevi aliĝilojn.


★

La kongreso okazos de la 26-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto 1975 en Falkonercentret en Fredriksberg — Kopenhago.

## FERVOJISTA PAĜO

ORGANO DE NORVEGA  
ESPERANTISTA FERVOJISTA  
ASOCIO — NEFA

Kaldbakkstubben 22, Oslo 9  
Redaktoro: Odd Kolbrek



El «Jernbanemanden» :

### En Ĉinio oni aĉetas germanajn lokomotivojn

Nun veturas germanaj dizellokomotivoj en Ĉinio. Grupo da germanaj fervojingeneroj estis en la ĉina popolrespubliko por instrui la ĉinojn kiamaniere oni funkciigas 36 tute modernajn 5500 ĉevalfortajn dizellokomotivojn. La lokomotivoj unuavice estas uzataj por vartransporto kaj laŭ montarlinoj. Kaj la fervojoj kaj la vojoj en Ĉinio estis eluzitaj, sed nun oni ege streĉas sin por plibonigi la komunikilojn, tio estas parto de la unua 5-jara plano.

El la bulteno de la aŭstra fervojista asocio :

### Ponto frans Granda Belto

La 16an de januaro 1973 la dana trafikministro proponis al la parlamento leĝon pri konstruo de ponto trans Grandan Belton. Ĝi skizas finigon de la konstruado je la 1a de januaro 1980, kaj tial la decido baldaŭ devos okazi. Se la parlamento akceptos la leĝon en la proponita formo, jen iom de la enhavo, kio povus interesi al la fervojo: La ponto estu alta ponto super la orienta kaj malalta ponto super la okcidenta parto de la Belto

(meze ja situas la insulo Sprogø kiun la ponto transiru). Seskoridora vojo por aŭtoj kaj 2 fervojaj trakoj. Sub la ponto estu sufiĉe da spaco por trapaso de ĉiaj ŝipoj. La staciojn de Korsør kaj Nyborg oni devos transloki. Kiam la ponto estos preta, la pramtrafiko de DSB trans Grandan Belton estu ĉesigata. Devos establiĝi administra organo, nomota Ŝtatponto Granda Belto. La ponto devos esti administrata tiel, ke la uzantoj devas pagi tiom kiom kostas rentumebla funkcio. Praktike DSB jaran sumon surbaze de, kion DSB povos enspezi per biletprezoj kaj frajtpagoj. La konstruado kostos laŭ nunaj kalkuloj iom pli ol 3 miliardojn da danaj kronoj.

El «Jernbanemanden» :

### «Mini»-trajno en Usono

En la internacia aerhaveno en Houston oni uzas datoregatan sistemon por pasaĝertrafiko. Estas malgranda elektra trajno. La radoj de la vagonoj estas el gumo kaj la reloj el malpeza metalo. Estas 3 vagonoj kun entute 36 sidlokoj. La kapacito estas po 2300 pasaĝeroj hore. La linio estas 2 km longa kaj interligas la 2 aerhaven-terminalojn, kiuj havas hotelojn kaj aŭtoparkejojn.

Ni prezentas :

## Kristana Esperantista Ligo Internacia

Administrejo: Leyweg 303, Den Haag, Nederlando  
Prezidanto: Adolf Burkhardt, Germanujo  
Sekretario: Tino Putto, Nederlando  
Redaktoro de 'Dia Regno' J. van Keulen, Nederlando



Inter la multaj «fakoj» de la esperantomovado ni trovas la kristanisman, kun fakdelegitoj, fakorganizajo, propra gazeto, fakkongresoj k.t.p. Kompreneble la fido neniam fariĝas fako, sed praktike oni povas registri tiun ĉi laboron inter la fakoj. Kaj oni sciu: Al kristanoj estas tute nature havi sian propran laboron, kie oni povas renkontiĝi — persone aŭ per presitaj vortoj, por interŝanĝi pensojn, disvastigi la fidon, honori Dion kaj ricevi novajn kurajojn kaj manĝaĵojn por la animo.

Jam en 1908 la laboro komencis — per hektografita gazeto. Kiam ties tria numero aperis ĝi estis jam presita, ĉar la abonanto-nombro jam estis 8, kaj kun tia subteno la redaktoro kuragiĝis iri al tia elspezo. Ni ja povas memori, ke la nombro de apostoloj estis nur 12, kaj ili konkeris la mondon! — Kaj dum la Kongreso en Antwerpen la 25. de aŭgusto 1911, la Ligo fondiĝis. Inter la fondintoj ni trovas norvegon, Honoratius Bonnevie. Kaj li faris gravan laboron por tiu ligo en nia lando ĝis sia morto, post kiam la Keli-movado en Norvegujo neniam havis veran gvidanton.

Internacie la laboro sekvis ondon linion. Kiam ĝi atingis sian unuan supron, la oficialan rekonon de la Kristana Asocio de Junaj Viroj kun ties rekomendo al esperantostudoj, la unua mondmilito eksplodis. Kaj tiel denove: Ankaŭ la dua mondmilito subfosis la ligon. Sed la laboro daŭris, kun la celoj: a. disvastigi la internacian lingvon inter Evangeliaj kristanoj. b. unuigi kristanajn esperantistojn, por ke per unu komuna lingvo gefratoj en Kristo havu efektivan kontakton kaj la eblecon ekzerci sin en kristna kunuleco kaj servado. c. enkonduki la aplikadon de Esperanto en la internaciajn rilatojn kaj agadojn de Evangeliaj eklezioj kaj organizoj. ĉ. uzi Esperanton por disvastigi la Evangelion de Jesuo Kristo.

Kompreneble la opa esperantisto plej bone vidas la laboron de la Ligo per la diservoj, ĉiam organizataj dum la Universalaj Kongresoj. Al tiuj venas homoj el multaj landoj por adori Dion per unu lingvo. Dum longa tempo estis problemo la himna kantado. La angloj havis sian himnaron, eldonitan de Montagu C. Butler, ek de 1910, sed tiu estis tro nacia. Same

la sveda Evangelia Kantareto de Arthur Wallin el 1948. Tial Keli starigis kantan komisionon, kies membroj el pluraj landoj kreis la novan kantan «Adoru Kantante» kun vere internacia enhavo.

Sed ne nur dum la Universalaj Kongresoj okazas diservoj. Fakte la esperanto-diservoj en Londono okazis seninterrompe jam de la jaroj antaŭ la unua mondmilito.

Bedaŭrinde la norvegaj membroj ne sukcesis fondi propran sektion, kaj tial ankaŭ neniam povis havi veran influon — tio estu en la esperantistaj rondoj aŭ inter kristanaj gefratoj. Tute alie en nia najbara lando, kie la sekcio estas sufiĉe granda kaj forta, ke ili povu efektive labori. Pro tio la sveda sekcio sukcesis — post la dua mondmilito — aranĝi grandskalan helpagadon inter rifuĝintoj kaj suferantoj, kaj sub la energia gvidado de la gesinjoroj Sandgren tiu sekcio sukcesis eĉ fari misian laboron malantaŭ la fera kurteno. Oni plurfoje diskutis, ĉu la norvegaj membroj aliĝu al la sveda sekcio, sed tio neniam realiĝis. Pro tio ĉiu norvega membro nun devas rekte aliĝi al la internacia organizaĵo.

Ro.

### «Homo kaj kosmo»

Ĉi tiun popularan natursciencan revuon eldonas Astronomia Observatorio de la Kroata Natursciencia societo kunlabore kun Kroata Esperantoligo, Zagreb. Ĝi aperas kvaronjare kaj kosta 12 kr. por unu jaro. La abonsumon oni povas sendi pere de poŝtmandato al: *Zvezdarnica*, 41103

Zagreb, *Opatička 22*, P. F. 38, Jugosl. Se oni dezirus sendi ĝin pere de banko, la ĉek-konto estas: Zvezdarnica, Zagreb, 301 - 620 - 1001 - 3096 r 622 (Kreditna Banka Zagreb), Jugoslavio.

## KORESPONDU!

21-jara studentino de medicina universitato dez. kor. Mi kolektas bildkartojn, poŝtmarkojn, gramofondiskojn kaj filmaktorojn, interesiĝas pri vojaĝo kaj geografio. Vanda Novak, Skryt. pont. 32, PL-96-100 *Skierniewice*, Polujo.

Polaj fratoj, 12-jara Wieslaw kaj 23-jara arbaristo Zbigniew tre volus korespondi kun internaciaj geamikoj. Nia adreso: Zbigniew kaj Wieslaw Harasymowicz, ul. Sowinskiego 23/5, PL-65-419 *Zielona Góra*, Pollando.

21-jara hungara universitata studento en la Sovet-Unio, stipendiulo de la Hungara Popolrespubliko, deziras koresp. kun knabino. Hobioj: filmo kaj foto. Amtmann Arpád, Proletarskij bulvar 37-10, 270015 ODESSA, Sovet-Unio.

Mi deziras korespondi kun geamiko de via lando. S.ino Peška Dobrena, Kom. Mladost bl. 81 v. 5, SOFIA 56, Bulgarujo.

20-jara hungarino deziras kor. pri dancmuziko, filmoj, libroj kaj interŝ. bildkartojn. S.ino Judy Katona, H-1111 Budapest, Saru u. 3, Hungarujo.

29-jara instruisto deziras korespondi. Interesiĝas pri lingvoj, esperantaĵoj kaj ĉiuj interesaj temoj. Salga Attila, H-3300 Eger, Olasz u. 13, Hungarujo.

## Norvega Kroniko

### KLUBO ESPERANTISTA EN OSLO

*Ŝipekskurso al Nesodden 10/6-74.*

Kiel kutime Eva kaj C. Støp-Bowitz invitis la klubon al sia somerdomo en Nesodden kie ĝuante la varman kaj belan veteron la 34 anoj kaj 1 gasto, Julio Osuna el Madrido, travivis agrablajn kaj memorigajn horojn.

Unue C. Støp-Bowitz donis informojn pri la esperanta universitato en Lieĝo, en kiu li elektiĝis kiel rektoro, kaj informis ke denove «Norda Prismo» aperos. Li transdonis diplomojn al Willy Gjertsen kaj Margrete Landmark kiuj kun eksterordinare bona rezulto plenumis la elementan ekzamenon. — La kluba gazeto «La Vagabondo», kiu estis tre interesa kaj amuza, prezentiĝis de Brynhild Østmo. — Ni gustumis bonan manĝaĵon kaj trinkaĵon kaj kun gitarakompano de R. Grotmål kaj tirharmonikakompano de C. Støp-Bowitz multe kantis.

*Sankta-Johana vespero, ekskurso al Tyrifjordo 23/6-74.*

Kiel jam kara tradicio en nia klubo, okazis Sankt-Johan-vespera festo ĉe la somerdomo de nia klubanino Else Bugge-Paulsen. Ni ĉiuj kiuj havis la okazon ĉeesti, pasigis tre agrablan tempon.

Tre agraba surprizo estis la ĉeesto de la ĉarmaj, viglaj geamikoj E. kaj J. Matland el Sauda, kaj de f.ino Else Margrethe Nielsen el Kopenhago.

La programo estis tute simple agrabla kunestado kun dancado laŭ akom-

pano de E. H. Wollebæk, C. Støp-Bowitz kaj J. Matland. Ĉe la strando H. de Caspary estis ĉeffajristo. C. Støp-Bowitz kantis i. a. pri naĝantaj sardinoj en diversaj lingvoj kaj li regaligis nin per artfajraĵo. R. Grotmål plezurigis nin per siaj belaj kantoj en Esperanto kaj en aliaj lingvoj. Otto Prytz surprizis kaj ĉarmis nin per etosoplenaj «Noktoj ĉe Moskvo». Ĉu pro sorĉa Sankt-Johana vespero, ĉu pro bonvolaj geamikoj kiuj pretas kontribui al komuna distro, mi ne scias, fakto estas ke ni ankoraŭ-foje pasigis neforgeseblan vesperon ĉe Tyrifjordo. 27 membroj kaj 6 gastoj ĉeestis.

Raportis *Pepita de Caspary.*

*Ekskurso al Aremark, Østfold, 31/8—1/9 1974.*

Ankoraŭfoje nia klubano Randolph Grotmål invitis al semajnfina restado en sia farmdomo, en kiu partoprenis 38 gesamideanoj — inter ili 12 svedoj el Skövde kaj Gotenburgo. Ni travivis ege agrablan restadon kaj varma kaj bela estis la vetero.

Sabatvespere ni en la fojnejo dancis laŭ akompano de Ester Wollebæk kiu ludis gitaron kaj C. Støp-Bowitz, akordionon. — Kari Kalsås, Randolph Grotmål k. John Berggreen prezentis amuzan skeĉon reĝisoritan de Brynhild Østmo, kaj nia gastiganto kantis akompanante sin mem per gitaro. — Post la vespermanĝo ni trinkis kafon kun kukoj kaj kantis laŭ akompano de niaj tri muzikistoj.

Post la matenmanĝo dimanĉe ni travivis agrablajn horojn laŭplaĉe — promenado, sinbanado kaj sunbrunigado ĝis okazis la tagmanĝo.

Posttagmeze ni hejmenvojaĝis kun-



ankaŭ al Svalbardo. — Dum la kutima lotumado la gajnaĵo i. a. estis legomoj kaj floroj.

Vendiĝis libroj por kr. 227,30.

portante memoron pri neforgesebla kunestado.

*Klubkunveno 4/9-74.*

Post bonvenigo de Kirsten Ek, Ludvig Anjer faris interesan paroleton pri la 59-a Universala Kongreso en Hamburgo. Li detale priparolis la diversajn partojn de la ampleksa kaj interesa programo. Poste li montris lumbildojn de la kongreso. Neoficialan raporton pri la kongreso faris C. Støp-Bowitz, — li, akompanante sin mem per akordiono, prezentis amuzan kanton pri la kongreso.

Tamiko Kaŭakami, kiu ĵus faris longan vojaĝon eksterlande, salutis de esperantistoj i. a. en Aŭstralio kaj Nov-Zelando.

Ĉeestis 31 anoj. — Vendiĝis libroj por kr. 78,80.

16/9-74. La prezidanto bonvenigis. Inger Richard montris kunportitajn legomojn el ŝia ĝardeno, klarigis kiel semi florojn kaj legomojn kaj montris diversajn semojn. — Pepita de Caspary montris spicaĵojn kaj florojn kaj klarigis kiamaniere oni povas apliki florojn kaj eĉ herbajon kiel tablo-dekoracion. — C. Støp-Bowitz priparolis la romanon «Verda robo», kiun Johan Hammond Rosbach ĵus verkis. Kirsten Ek informis pri la ekskursoj — i. a. tuttaga ekskurso al Lyngenfjordo — kaj la cetera programo dum la Norvega Esperanto-Kongreso venontjare en Tromsø. Post la landa kunveno okazos ekskurso al Norda Kabo kaj estos ebleco por ekskurso

## Korespondu!

Edzino kun du junaj filoj serĉas korespondantinon en Norvegujo. Miaj ŝatokupoj estas muziko, Esperanto k. laboro en la ĝardeno. — S.ino Mary Austin, 15 Haselbury Road, Totton, Hampshire, Anglujo.

Mi deziras havi korespondon kun gesamideanoj de la tuta mondo. Luis Fernando Martínez Solís, Kesto Aerpoŝta 6950, MEDELLIN, Kolombio, Suda Ameriko.

---

### NORSK ESPERANTO-FORBUND (*Norvega Esperantista Ligo*)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 10030  
Kontoradrese: General Birchs gate 30, Oslo  
Telefon: 69 14 39

Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30—16.30

*Turisma Servo:*

Boks 942, Oslo. Postgiro 10032

### ESPERANTOFORLAGET A/S (*Eldonejo Esperanto A/S*)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 10031  
Kontoradrese: General Birchs gate 30, Oslo  
Telefon: 69 14 39

*Ĉefdelegito de U.E.A.:*

S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a,  
Oslo 6. Postgiro 1 33 29

*La redakcio:*

Hans Amund Rosbach, Nergt. 37 c,  
6500 Kristiansund N. Telefon: 77 6 20

*Ekspedejo de Norvega Esperantisto:*

Boks 942, Oslo 1

---

Trykt i HAAVES BOKTRYKKERI, Brumunddal